



INA havas sian sidejon en Herzberg, la oficiala Esperanto-urbo (Germanio). Tie vi trovas ne nur belegan naturon, sed Esperanto-centron (ICH), ginsengo-butikon kaj la kuracejon de la prezidanto de INA, Harald Schicke. Ĉiuj servas ankaŭ en Esperanto.

Multaj ŝildoj en Herzberg estas dulingvaj (germana/esperanta), ekzistas specialaj Esperanto-manĝaĵoj kaj menukartoj en Esperanto.

INA estas faka organizo en esperantujo, kiu pritraktas la problemojn de sano. Nian organizon gvidas profesiaj fakuloj, tamen en ĝi partoprenas ankaŭ amatoraj, ordinaraĵoj homoj, ĉar la sano sendube estas problemo de ĉiuj homoj.

INA ne emas kontraŭstari, nek ekskluzivigi la modernan, kutiman medicinon, sed prefere favoras al kunekzistado.

La principo de nia natura kuracado tamen malsamas al tiu de moderna medicino.

Ni opinias, ke homoj povas nature kuraci siajn malsanojn, ĉar ili estas unu parto de la naturo, kaj ne dependigi sin de kemiaj medicinaĵoj.

Ni kredas, ke obei al la leĝo de la naturo kaj helpi al la natura forto en la homa korpo, estas la ŝlosilo por kuraci malsanojn.

INA estis fondita en la jaro 1986 kaj havas membrojn en la tuta mondo.

Niaj membroj estas fakuloj aŭ simpatiuloj aŭ simplaj interesuloj pri alternativa kaj naturkuraca medicinoj.

Se vi havas intereson pri naturkuracado, ni proponas al vi membriĝi al nia asocio. Via aktiveco ĉiam estas bonvena! Precipe gravas viaj artikoloj por nia revuo.

Vizitu nin en interreto je **www.ina-asocio.info**. Tie vi trovas ĉiujn ĝis nun aperintajn revuojn. Skribu al **ina-asocio@web.de** aŭ al

Rosa Ebel (sekretariino de INA)
Schmiedestr. 99
47809 Krefeld, Germanio

**Vizitu la INA-kunsidon dum tiu ĉi
Universala Kongreso!**

Aliĝilo

INA havas tri kategoriojn de membroj:

1. membroj kun retaliro, kiuj deziras la INA-revuon rete - **membreco senkosta**
2. membroj sen retaliro aŭ kun la deziro ricevi la INA-revuon en papera formo, pagas nur 14 € jare
3. membroj subtenantoj pagas minimume 20 € kaj laŭdezire ricevas la retan aŭ paperan INA-revuon

Mi aliĝas al INA en la kategorio 1 , 2 , 3 (bv. krucumi)

Kompleta nomo:

Strato:

Poŝtkodo, urbo:

Lando:

Retadreso:

Mi estas fakulo , laiko (bv. krucumi)

Min interesas precipe jenaj temoj:

Mi pagas eblan kotizon al la konto (bv. krucumi)

de INA ĉe UEA: enao-y

Commerzbank je nomo Ginseng-Laden, Konto-Nr. 682745500, BLZ 290 400 90
IBAN: DE49 2904 0090 0682 7455 00 BIC: COBADEFFXXX

PayPal-konto: mzverlag@[web.de](mailto:mzverlag@web.de)

surloke al jena INA-funkciulo:

Dato, subskribo